


SUDFRANCIA STELO



Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono
N° 129-2a kvaronjaro 1994- Jarabono 30F al

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP 956-28P Montpellier

ESPERANTO

Bilan du 86^e congrès

Le 86^e congrès national des Espérantophones français vient de se tenir en Agde.
Compte rendu.

LES Espérantophones français ont tenu leur 86^e congrès national à la salle des Fêtes d'Agde du 11 au 15 mai 94. 143 personnes se sont inscrites et ont assisté à l'ouverture officielle, jeudi 12 mai à 10 h, en présence du maire d'Agde, M. Régis Passerieux. Parmi ces 143 personnes, on remarquait la présence d'une Allemande, un Anglais, deux Suisses, une Russe, deux Espagnols Catalans.

Les activités, nombreuses et variées, se sont succédé pendant quatre jours, dans un cadre agréable et par un temps mi-figue mi-raisin.

1. Trois conférences dont une présentée par Nina Korjenskaja, doyenne de l'université d'Ufa en République autonome de Bashkirie (Russie), nous a comblés en dévoilant des aspects secrets et totalement inconnus de l'évolution de l'art russe au cours des siècles.

2. Quatre soirées culturelles, toutes réalisées par des

amateurs :

a) Présentation de quelques sites du Languedoc-Roussillon, thèmes de nos excursions (Pézenas et Molière, canal du Midi et Riquet, bassin de Thau et Sète, le Catharisme, ses sites et châteaux) et de quelques-unes de ses nombreuses spécialités gastronomiques (croquants, grisettes, écussons, pâtés, Picpoul, blanquette, muscats).

b) Soirée théâtrale, typiquement espérantophone puisque entièrement jouée en espéranto, avec notamment "Le curé de Cucugnan" d'A. Daudet, et quatre autres petits pièces en un acte.

c) Soirée musicale avec l'ensemble de mandolines "L'Estudiantina" de Béziers et des danses folkloriques locales avec le groupe "Les treilleurs montblanais".

d) Spectacle-hommage à G. Brassens à la salle Tarbouriech du Théâtre de la Mer de Sète, avec deux groupes qui se sont réunis

pour l'occasion. Ce spectacle a été fort apprécié pour la qualité des musiciens, celle des chanteurs et pour l'originalité de la présentation (jazz et mise en scène de quelques chansons du poète de l'amitié sétois).

3) Six excursions offraient un vaste choix pouvant satisfaire les goûts géographiques, historiques, littéraires, touristiques, gastronomiques, musicaux de chacun.

a) Agde et le Cap d'Agde.

b) Ensérunes et les écluses de Fonsérannes.

c) Pézenas, Molière, et le vermouth Noilly-Prat à Marseillan.

d) Sète, ses magnifiques panoramas, Fortant de France et les caves de muscats.

e) Sur le canal du Midi et l'étang de Thau de Agde à Sète.

f) Minerve, canal du Midi, Carcassonne et sa cité.

4) Des séances de travail, mais oui, avec débat sur la

vie du mouvement espérantophone, diffusion d'une cassette vidéo montrant l'intérêt d'une langue de communication universelle ne véhiculant aucune hégémonie particulière, perspectives de promotion de l'espéranto dans la construction européenne actuelle, élections du nouveau conseil d'administration.

A ce sujet, notons qu'au moment où tous les partis politiques, du moins en France, s'aperçoivent enfin que la Femme existe, l'Union française pour l'espéranto a remplacé son ancienne présidente (Renée Triolle) par une autre femme (Claude Nourmont), sans oublier la secrétaire générale (Raymonde Peyrault) et la trésorière (Barbara Despiney). Voilà qui prouve une fois de plus que les espérantophones ont, selon une expression récente, plusieurs longueurs d'avance, dans le temps et l'espace, et surtout dans l'esprit.

Interesa kultura programo

Dum Pentekosto okazis en Agde, proksime al la mediteranea marbordo, la 86-a Kongreso de Unuiĝo Franca por Esperanto, kun 150 partoprenintoj, ne nur francaj. Ĝin karakterizis interesa kultura programo en la internacia lingvo, kun abundo da ekskurseblecoj, kiuj aldonigis al la tradiciaj laborsesioj.

Nina Korjenskaja el Ufa (Rusio) rimarkinde prelegis pri la rusa arto en la 20-a jarcento. La Esperanto-grupo de Béziers prezentis i.a. "Budapeŝtan ekzamenon" kaj Esperanto-Gironde ravis ĉiujn per sia omaĝa spektaklo al la fama kantistopoezo Georges Brassens, kiu naskiĝis en Sète, loko, al kiu ekskursis la kongresanoj.

Claude Nourmont estis elektita prezidanto de UFE.

Pro la lasta nacia kongreso en Agde en Majo,

la **Federacia Kongreso**

okazos en **Béziers,**

Dimanĉon, la 25an de Septembro.

Kunveno ekde la 10a horo

(informiĝu en Septembro pri la loko)

Bilanco, planoj por la nova jaro, elekto de nova estraro
Posttagmeze ni raportos pri la someraj ferioj en Esperantio.

Ni kalkulas je via partopreno !

Agrablajn somerferiojn !

Postkongrese.

Nacia Esperanto-kongreso malofte okazas en nia regiono. La lasta estis, laŭ la diroj de aliaj periodaĵoj, "bunta kaj enhavenriĉa".

Dankojn al tiuj, kiuj ebligis ĝian realigadon. Se foje mankis homfortoj, ne kulpas tiuj, kiuj provis kontentigi la kongresanojn.

En tiu-ĉi bulteno vi povos legi plurajn paĝojn pri la artikoloj aperintaj en la gazetaro kaj la dokumentoj disdonitaj al niaj gastoj. SFS eĉ elspezis du kopekojn por akiri historian ekzempleron de "La klaĉo", el ĝi vi povos ĉerpi tutan stokon da insultoj en esperanto (ne por uzi dum viaj klubaj kunvenoj, kompreneble; nek dum la federacia kongreso).

Bonan legadon. Pasigu ripozigajn feriojn: ni bezonos vian energion aŭtune. De la feliĉuloj, kiuj ĝuos kelkajn tagojn en Esperantio, ni atendas raportojn por plenigi la venontan bultenon. Anticipan dankon !

J.H.

Raportoj kaj Raportistoj :

Ne estas ĉiam facile aperigi artikolojn en la gazetaro eĉ dum kaj pri nacia kongreso. Estis la kazo en Agde, kie la oficejo de "Midi Libre" troviĝis vidalvide de la kongresejo. Certe la raportisto estis tre okupita, ĉar, malgraŭ pluraj klopodoj niaflanke, li ne trovis kelkajn minutojn por viziti la aranĝon. Malgraŭ lia promeso de artikolo kun foto, artikolo aperis sen foto. Komparu ankaŭ la aperintan artikolon kun la teksto sendita (lasta paragrafo). Feliĉe estis aliaj gazetoj, kiuj pli detale raportis pri la evento...

"Midi Libre" (Edition de Béziers)
23 V 94

Le temps d'un week-end

Agde, capitale des "espérantistes"

■ Pendant le long week-end de l'Ascension, "l'Union française pour l'espéranto" a tenu son congrès annuel à Agde. Près de cent cinquante délégués des différentes régions de France mais aussi des pays voisins, Espagne, Italie, Suisse, Allemagne, Luxembourg, Grande-Bretagne, ainsi que de Bulgarie, Pologne, Russie, Etats-Unis y ont participé. L'ouverture officielle s'est déroulée en présence de Régis Passerieux, maire d'Agde, conseiller général.

Programme touristique varié

Le programme touristique

varié a permis aux congressistes de découvrir Agde et ses environs. Une croisière sur le canal du Midi et l'étang de Thau, les a emmenés à Sète où un hommage a été rendu à Georges Brassens en français et dans la langue internationale par la jeune équipe de "Espéranto-Gironde".

Dans la salle des fêtes se sont déroulées une soirée théâtrale, montée par le groupe de Béziers, ainsi qu'une soirée musicale avec le concours de "l'Estudiantina" biterroise et des "Treilleurs Montblanais". Deux expositions ont été présentées en ville, la première avec la collaboration de "l'Association

philatélique agathoise" à la Maison du cœur de ville, la seconde avec des dessins d'enfants de différents pays, à la MJC.

Parmi les travaux dans la langue internationale, à signaler deux conférences, l'une par une universitaire de Bachkirie (Russie centrale) sur la peinture russe, l'autre par une Polonaise sur les secrets de la jouvence éternelle d'après les lamas tibétains ; à noter encore un débat sur l'année de la famille, et bien sûr une assemblée générale pour coordonner l'action nationale.

Les prochaines échéances électorales ont été évoquées.

La plupart des candidats occultent le problème linguistique en Europe qui devient pourtant de plus en plus urgent. L'espéranto faciliterait la communication entre les européens, ont estimé les congressistes, ceci tout en respectant les différentes langues nationales et régionales. Pour eux, plus que jamais, l'espéranto reste d'actualité (un moyen simple de s'informer : 36 15 espéranto).

Une excursion d'une journée, sur les traces des Cathares, leur a permis de découvrir Minerve, Carcassonne, les Corbières et de se replonger dans une histoire encore vivante.

Esperanto, un droit à la communication.

Les prochaines échéances électorales ont été évoquées; la plupart des candidats occultent le problème linguistique en Europe qui devient de plus en plus urgent. L'Espéranto faciliterait la communication entre les Européens, tout en respectant les différentes langues, nationales ou régionales. Plus que jamais, l'espéranto reste d'actualité. Un moyen simple de s'informer: 36 15 Espéranto.

Une excursion d'une journée "sur les traces des Cathares" permettait de découvrir Minerve, Carcassonne, les Corbières et de se replonger dans une histoire encore vivante.

Les congressistes remercient les Agathois et les Agathoises de leur bon accueil et tout spécialement les services de la mairie pour leur aide efficace.

Ni parolas esperanton

Le Cercle Biterrois d'Esperanto a présenté une soirée théâtrale, un diaporama, et un concert.


JEUDI 12 mai, sur la place du marché, à Agde, on aperçoit de loin, ces morus de communication internationale : hommes et femmes sandwich, stand avec information et pétition où on est accueilli par un gentil "saluton", ou "bonan tagon", par les plus jeunes, les plus anciens préférant le "bonjour".

Les passants s'arrêtent pour voir. Quelques uns signent. Les congressistes sont là depuis hier, mercredi, et ont déjà eu le temps de faire connaissance entre eux et aussi avec notre région, grâce au superbe diaporama, présenté par le cercle biterrois d'Esperanto.

Maintenant, après l'inauguration de l'exposition philatélique à la Maison du Coeur de ville, on se réunit à la salle des Fêtes. A 10 heures, Régis Passerieux, maire d'Agde, arrive. Jean Henin, président de la Fédération Esperantiste du Languedoc-Roussillon, ouvre solennellement le 86^e Congrès France-Esperanto, réunissant toutes les associations culturelles esperantophones de France. On salue les délégations étrangères : allemande, bulgare, britannique, étatsunienne (pour ne pas dire américaine), catalane, luxembourgeoise, polonaise, russe et suisse

"Agde, ville qui depuis des siècles reçoit le pollen des civilisations", où on a toujours parlé beaucoup de langues différentes, est fière d'accueillir les esperantistes, dont la volonté est de "dépasser les frontières, d'unifier l'humanité pour vivre ensemble", dit Régis Passerieux. Une fillette, la plus jeune congressiste, récite un poème en esperanto, dont on peut résumer le sens par un proverbe chinois "Goutte après goutte, l'eau creuse le rocher et fend la montagne".

Après quelques mots du secrétaire des jeunes esperantistes, c'est le discours, bref et concret, de la présidente nationale, Renée



Triolle, qui parlera des acquis, surtout dans le domaine de l'information du public, il existe déjà un service télématique 3615 ESPERANTO, de nombreux livres et dictionnaires ont été édités, dont récemment un dictionnaire scientifique français-esperanto par Jacques Juguin ainsi que "Le défi des langues : du gâchis au bon sens", de Claude Piron, paru chez l'Harmattan.

De grands linguistes contemporains Umberto Eco et Claude Hagège ont apporté leur soutien à l'esperanto en constatant qu'une langue nationale ne pouvait pas jouer le rôle

d'une langue internationale. Les Français ayant pris conscience de la valeur de leur propre identité culturelle, la seule barrière qui reste aujourd'hui est psychologique. Aux esperantistes de prouver l'utilité et la vitalité de l'esperanto.

Dans l'avenir proche, les principaux buts sont : une association unique pour la France (finies les querelles de clochers !), et l'édition d'un grand journal national avec des suppléments régionaux remplaçant l'infinité de bulletins existants. Le vin d'honneur avec le maire clôture la partie officielle qui n'aura pas trainé, car vers 11 heures, le programme culturel s'ouvre avec la conférence, richement illustrée par des dia-

positives, sur la peinture russe du XX^e siècle, par Nina Korïenievskaja de l'Université de UFA en Bachkirie (ex URSS).

La troupe biterroise.

Après les excursions de l'après-midi, le soir place au théâtre. Le Cercle Biterrois, passionné par l'art dramatique grâce à l'enthousiasme de Jean-Pierre Peray, montera sur les planches pour présenter notamment "Le Curé de Cucugnan". Vendredi soir, de nouveau, les biterrois distrairont le congrès : un concert de l'Estudiantina qui partagera la soirée avec le groupe folklorique "Les Treilleurs Montblanais". Nous y reviendrons.

Marie TUORA.

Alia foto pri la kongresa libroservo
akompanis tiun artikolon.

Ne nur ekskurso...

La lastan tagon de la kongreso okazis tuttaga ekskurso : unue al Minerve (pro la pluvoj, ni ne povis viziti la naturajn pontojn) kaj poste al la konata fortikaĵo de Carcassonne. En tiu urbo atendis nin la urbestro, S-ro Raymond Chesa, kiu estis (kaj estas reelektita) Eŭro-deputito. Menciinde, ke en nia regiono estis du Eŭro-deputitoj, kiuj ambaŭ estas reelektitaj (la alia estas S-ro Martinez de la "Nacia Fronto"). S-ro Chesa akceptis nin tre afable; li donacis al Raymonde Pérault, la nova ĝenerala sekretario de UFE, memormedalon de la urbo. Jean Hénin, nome de la kongreskomitato, oferis al S-ro Chesa la novan libron de Claude Piron : "Le défi des langues, du gâchis au bon sens". Nia Eŭro-deputito montris sian intereson kaj promesis tralegi ĝin okaze de unu el siaj flugoj al la Parlamentejo de Strasburgo.

L'indépendant

LUNDI 16 MAI 1994

Carcassonne

CONGRESSISTES EN EXCURSION A CARCASSONNE

L'espéranto, un droit à la communication

M. Meunier, qui habite à présent Carcassonne, a rencontré l'espéranto en 1932, au Maroc. *« J'avais un prof d'arabe qui maîtrisait l'espéranto et qui un jour, sur le marché, a pu s'entretenir avec une Danoise de passage. Pour moi, l'espéranto, c'est ça : une langue de communication. »*

Synthèse de langues européennes par son lexique, l'espéranto es rapproche des langues non-européennes (agglutinantes) par sa structure. Son ossature grammaticale se fonde sur 16 règles de base sans exceptions. L'alphabet est phonétique et l'on note l'absence de verbes irréguliers. Autre avantage non négligeable, l'apprentissage de l'espéranto réclame 8 fois moins de temps que celui d'une autre langue. Enfin, les espérantistes disposent d'un annuaire de 3000 adresses de responsables dans 120 pays qui peuvent les mettre en rapport avec d'autres espérantistes. Nombre d'entre eux ont visité par ce biais des dizaines de pays sans en connaître la langue.

Du 11 au 15 mai à Agde, ils étaient environ 150 participants au 86e congrès France-Espéranto. C'est à l'issue de cette réunion qu'une cinquantaine d'entre eux - parmi lesquels une Américaine, une Russe, des Polonais, des Allemands, des Bulgares... et des Français- se sont rendus à Carcassonne pour une excursion



Une cinquantaine d'espérantistes reçus par le maire de Carcassonne

Photo Pierre DAVY

d'une journée. Reçus salle Joë Bousquet par le maire, certains membres de cette assemblée de congressistes tellement cosmopolite ne parlant pas français ont dû déplorer que le premier magistrat ne maîtrise point la langue élaborée en 1887 par Louis-Lazare Zamenhof.

Sitôt après le maire, c'est Raymonde Pérault, toute nouvelle secrétaire de l'Union France-Espéranto (élue depuis trois jours) qui a pris brièvement la parole, suivi de Jean Hénin, président de la fédération Languedoc-Roussillon des centres culturels pour l'espéranto.

* Pour tout renseignement relatif à l'espéranto ou à son apprentissage, il existe un serveur Minitel 3615 ESPERANTO. Localement, il est possible de prendre contact pour des cours par correspondance avec Cesareo Borque, 6 rue Pablo Neruda, 11000 Carcassonne

Tri gazetoj estis informitaj pri nia vizito al la urbdomo de Carcassonne, du raportistoj venis kaj longe intervjuis. Jam la sekvantan tagon aperis la raportoj. Kiel en Agde, "Midi Libre" ne raportis tute favore, ĉar la ĵurnalisto estis skeptika pri esperanto. Tamen, post rendezvo kun nia loka delegito Cesario Borque, iom poste aperis dua artikolo. Ĉiufoje grandformata foto akompanis la tekston kaj la duan fojon nia delegito kaj amiko estis la "stelulo". Jen kelkaj partoj de la du artikoloj. Gratulojn al Sro Borque pro liaj klopodoj.

L'Espéranto, langue d'hier ou de demain ?

Une cinquantaine d'espérantistes ont visité la Cité. Ce fut l'occasion de plaider en faveur de cette langue universelle trop méconnue

grette le caractère confidentiel de l'espéranto et l'hégémonie de la langue de Shakespeare, il n'en reste pas moins vrai que les espérantistes espèrent toujours voir se développer la pratique de cette langue. Les arguments en faveur de l'Espéranto ne manquant pas. Cette langue, complète et riche, peut être utilisée aussi bien en littérature, en diplomatie que dans le commerce et les sciences. Elle répond aux impératifs demandés à une langue mondiale et s'apprend huit fois plus rapidement qu'une autre langue (150 à 200 heures d'études contre 1.500 à 2.000 pour l'Anglais par exemple).

/. « L'Espéranto est une langue agglutinante. Zamenhof qui a étudié plus de dix langues d'origines slaves ou latines a fait une synthèse des langues européennes par son lexique et d'autres langues comme le Chinois par sa structure ». ./.

L'Espéranto présente l'avantage de posséder une ossature grammaticale régulière (16 règles de base, alphabet phonétique, formation de mots à l'aide de radicaux et d'affixes, etc). Par exemple, à partir du mot Sana qui signifie santé, on peut créer 52 mots différents par la simple apposition d'un préfixe ou suffixe.

L'Espéranto qui compte quelques milliers d'adeptes en France, dont 800 en Languedoc-Roussillon, connaît actuellement une grande poussée dans les pays du Tiers monde qui repoussent la langue et la culture anglosaxone. « L'Espéranto privilégie la communication avant tout, sans sous-entendu économique. Son enseignement mobilise moins d'énergie et de moyens, et préserve la culture de chaque pays. » Tout un programme.

Si vous êtes intéressé par l'Espéranto. Contacter M. Cesario Borque, 6 rue Pablo Neruda à Carcassonne (68.25.45.13) ou faire 36-15 Espéranto.

A la découverte d'un langage universel

Les espoirs d'un Espérantiste

« Nous sommes patients, déclare Césario Borque délégué de l'Association Universelle d'Espéranto dans l'Aude. « Il a fallu 2 siècles pour que le système de numérotation arabe soit accepté par les Européens. Le système métrique décimal, élaboré lors de la révolution française, n'a été adopté par les Anglais qu'il y a quelques années. Les idées ne s'imposent pas rapidement. »

Une activité large

Malgré un auditoire assez mince, les Espérantistes disposent d'un large choix de revues culturelle, sportive, touristique, religieuse, éditées en Espéranto.

A cela il faut ajouter plusieurs milliers d'œuvres originales et les nombreux chefs-d'œuvre des littératures nationales et locales traduits (cela va de la Bible au Coran, de Mao Tsé-toung à Shakespeare, de Sartre à Maupassant) :

« Pour l'anecdote, ajoute Césario Borque, j'ai envoyé les "Lettres persanes" de Montesquieu à une Iranienne avec qui je correspondais en Espéranto. »

L'inventaire serait incomplet sans évoquer la radio qui émet régulièrement en Espéranto. Une vingtaine de stations assurent des émissions quotidiennes ou hebdomadaires.

« Les jeunes ne sont pas oubliés, puisqu'ils disposent d'un magazine et même d'une association regroupant des groupes de rock espérantistes. »

Devant cet éventail le peu d'impact de cette langue "universelle" surprend. Pour Césario Borque la raison en est très simple :

« L'Anglais est prédominant dans le monde pour des raisons matérielles, déclare Césario

Borque. Une carrière professionnelle ne peut s'envisager sans connaître ou maîtriser les bases de cette langue. L'Espéranto n'a pas cette assise économique. Il y a aussi un autre facteur qui empêche, pour le moment, l'Espéranto de remplir sa mission. Songez que si jamais nous arrivions à "imposer" notre langue, tous les traducteurs seraient mis au chômage. Ce lobby est puissant. Des intérêts financiers considérables sont en jeu. »

La deuxième langue rêvée par les jeunes

Cette langue internationale s'apprend assez facilement.

Avec des structures grammaticales et lexicales régulières elle est la deuxième langue rêvée pour les jeunes enfants qui sont au maximum de leur capacité mémorielle.

C'est sans doute pour cette raison que l'emblème choisi par les Espérantistes est une étoile à cinq branches (chaque branche symbolisant un continent) de couleur verte (couleur de l'espoir). Le combat des Espérantistes s'inscrit aussi sur le plan du droit à l'égalité linguistique, le droit à la dignité et à la non-discrimination dans les communications qui sont des "droits de l'homme" élémentaire.

Pour plus de renseignements contacter Césario Borque, 6 rue Pablo Neruda, 11.000 Carcassonne. Tel : 68.25.45.13.



IOM da HJMJRO

Desegnaĵoj de Bernard Legeay pri la nacia kongreso de Agde aperintaj (krom unu) en la "kongresa libro".

← La apuda desegnaĵo rilatas al la ĝenerala kunveno. Feliĉe malmultaj dormis, la plimulto aktive partoprenis kaj decidoj estis faritaj.

↓ Dum la muzika vespero kun "L'Estudiantina" de Béziers ludis muzikisto per muzika segilo. Vole nevole akompanis lin la aŭskultantoj pro la bruemaj seĝoj...

DUM LA MUZIKISTO MUZIKAS PER MUZIKA SEGILO,
LA SPEKTANTOJ LUDAS PER MUZIKAJ SEĜILOJ.



Nia regiono fieras pri siaj variaj vinoj. Dum la kongreso ni gustumigis al niaj gastoj la lokan "Picpoul de Pinet" kaj la delikatan muskatvinon el St Jean de Minervo. Dum la ekskursoj, ili ankaŭ malkovris la "Noilly Prat" en Marseillan, la aromajn vinojn de "Fortant de France" en Sète, la muskatvinon de Frontignan kaj ne laste la Korbierajn vinojn en Lagrasse, ĉe la familio Carbonnel, kiun ni denove dankas pro la amika akcepto. Ankaŭ eblis aĉeti en la kongresejo botelojn de la fama ŝaumvino "Blanquette de Limoux" kun E°-etikedo...





Certe la antaŭlasta tago de la kongreso estis memorinda. 80 kongresanoj kaj tri muzikistoj navigadis kvarhore sur la kanalo de la sudo kaj la lago de Thau, poste malkovris la mirindan urbon Sète kaj fine spektis la muzikan omaĝon al Brassens, "Vizito ĉe Oĉjo Georges", fare de la 20-persona trupo de Esperanto-Girondio (aldoniĝis pluraj dekoj da personoj por tiu spektaklo). Laŭdire la krosado estis tre agrabla, la muziko ĝuinda, la paeljo surŝipe frandinda, la panoramo en Sète tre bela kaj fine la spektaklo perfekta. Kaj ni apenaŭ troigas! Malĉeestintoj malpravavis...



La kongreso finiĝis per tuttaga ekskurso "Sur la spuroj de la Kataroj". La muzeo Hurepel en Minerve rememorigis pri la tragedio de la Kataroj kaj la 240 martiroj en tiu pitoreska vilaĝo. Sur la du sekvantaj paĝoj, vi trovos la akompan-tekston, speciale preparitan por la vizito de tiu muzeo. Relegu ĝin, se vi iom forĝesis pri tiu epoko. Kaj se vi ne konas Minerve, vizitu ĝin iam kaj profitu la okazon por viziti apude la restaĵojn de la kvar kasteloj de Lastours aŭ la gigantan kavernon de Cabrespine. Se Esperanto ne estas religio kaj la esperantistoj ne estas sekto, tiam esperantistoj ne riskas la teruran sorton de la "Kataristoj". Fakte ĉiuj kongresanoj, partoprenintaj la ekskurson, revenis kontentaj. Ĉu pro la lasta vizito de keloj?



Murdo de RASPUTIN !

La princo IUSSOPOV
la grandduko PAVLOVIŜ
KAJ
La deputito PURITCHKEVIĈ
murdigis lin en la Duma!

La granda diboĉulo de la kortego ne plu
influos la Carinon ALEKSANDRAn!
Legu la internan artikolon.

Sur la granda placo de
ESPERANTGRAD
Liza GRIGORIEVNA ven-
dos siajn plej belajn fiŝojn
okaze de la 1a de janua-
ro. Rezervu ŝiajn plej
belajn pecojn !

ĈIO EN BONA ORDO!
Lastan Ĵaŭdon en la strato Belulino
okazis grava batalo inter fratinoj
Rondformo kaj Fazeolino. Ambau de-
ziris kapti la atenton de sinjoro Lasuŝa-
ri, kiu en tiu loko serĉis fratinanimon
por trapasi ekster sia edzino agrablan
momenton. Policistoj bridis senpro-
bleme tiujn du panterojn kaj ĉiuj finis la
vesperon orgie en la policejo.

Lernu iomete!

Jen kelkaj esprimejoj, kiujn
vi povos, sen problemoj,
ĉiokaze uzi. Ĉerpitaj el
EZOKO de Vaure:

Mi juras al vi je la sangaj
ulceroj de Sankta(nomo)!
Korpo de porko!
Simila okazo neniam plu
pendos ĉe via nazo!
Pistu min Petro!
Familia relikvo!
Kisu al mi la piedfingrojn!
Trinajla Kristo!
Leku miajn orelojn, vi
zigzagazulo!
Bridu la langon!
Mi regalos al vi duoblan
survanganon!
Flavokula kukolo!
Germana sakramento!
Furzo de bufo!
Seka pediko!
Laurinpedelo!
Laksigilo por ratoj!
Lepro putrigu lin ! (ŝin)
Fermu la kranon!
Sepvolva vipuro!
Mi flikos al vi la umbili-
kon!
Fekajmuldilo!
Vomrestajo!
Miskudrita fazeolo!
Cimbredisto!
Friza pulo!
Pesta intesto!
Sengiba kamel-in-o!
Frakvestita gorilo
Seŝela kolbaso!
Baŝibuzuko!
Abortilino!
Sankta naztruo!
Bakita skarabo!
Ŝima kataplasmo!
Miskurba kukurbo!
Iru al la bundoj!
Ikono-klasto!
Fridpisulo!



Ne forgesu antaŭ ol foriri
viziti la belan EFEBO en
muzeo de CAP d'AGDE,
ĝi certe ravos vin!



MURDO DE RASPUTIN

Pri la morto de Rasputin
ni ne ricevis sufiĉe da de-
talaj por vin informi pri tiu
grava evento, sed tamen
ni faros specialan eldo-
non, tuj kiam ni ricevos
pliajn sciigojn. Restu kvie-
taj, se vi deziras ĉeesti la
entombigon, ni organizos
vojaĝon per triĉevala glit-
veturilo. Enskribiĝo ĉe Ni-
kolajj FILIPÓVIC, estu
akurata, certe mankos sid-
lokoj, ni ĝoje amuziĝos.

Savu Vin!

La Parokestro de Cu-
cugnan akceptos ĉiujn
bonkorajn animojn, kiuj
deziras scii pri la bonaj
kondiĉoj por atingi facile
la Paradizon. Rendezuo,
laŭ via demando, ĉu tele-
fone ĉu 3615.

JEN NI !

De 12 jaroj la grupo de
Béziers organizas prin-
tempan staĝon. Komen-
ce, modeste en Valras-
Plage ĉeestis, dum 2 ta-
goj, doko da personoj ĉefe
klubanoj de Béziers
poste venis Langvedok-
anoj.

Ni serĉis alian lokon pli
taŭgan por akcepti tiujn
eksterbéziers-lernantojn.
Tial ni staĝis en "Sabl-
ères" ne tre taŭga por
plenkreskuloj, poste en la
kastelo de "Cassan" nor-
de de Pezenas, agrabla
loko en renoviĝo sed la
municipaj balotoj, kun no-
va Urbestro, forŝetis tiun
kastelon de la socia vivo
de Béziers.

Dank'al nia federacia Pre-
zidanto, ni venis en Bati-
paume sed pro striko, an-
taŭ 3 jaroj, ni revenis en
Béziers, kie ni loĝis en ur-
ba luksa akceptejo, ĉar
post balotado venis pli
socia urbestro.

La striko ne daŭris eterne
do ni revenis en Batipau-
me, kie la loko kaj situo
multe plaĉas.
La multnombraj parto-
prenantoj kontribuas efike
al sukceso de tiu staĝo,
tutkore ni vin dankas.

Post lasta LKK. . .

La kuniklo de la filino de
La L.K.K. prezidanto
bone atingis la Canour-
gue sed post amsopira
seniluziigo ĝi grave de-
primas.

(Unua parto de ekspozicio montrita en Agde dum la kongreso; la teksto kaj ilustraĵoj estas en reduktita formato. Apud ĉiu poŝtmarko estis nigrablanka pligrandigita bildo de la poŝtmarko)

Petite histoire du Languedoc-Roussillon par les timbres:

Konciza kaj nekompleta historio de Langvedoko-Rusiljono per poŝtmarkoj.



Préhistoire: Notre région est riche en traces de la Préhistoire. En 1971 furent trouvés à Tautavel les restes du plus vieil Européen, âgé de 450.000 ans.

Prahistorio: Nia regiono estas riĉa je spuroj de Prahistorio. En 1971 estis trovitaj en la vilaĝo Tautavel la restaĵoj de la plej maljuna Eŭropano, kvarcentkvindekmiljaraĝa.

Pour illustrer cette période, les peintures de la grotte de Niaux dans le département voisin de l'Ariège.

Por ilustrati tiun periodon, jen la pentraĵoj en la kaverno de Niaux en la apuda departemento Ariège.



Il y a plus de 2000 ans...Antaŭ pli ol dumil jaroj les Grecs ont occupé notre région et le célèbre "Ephèbe" d'Agde illustre parfaitement cette période...la Grekoj okupadis nian regionon kaj la fama "Efebo" perfekte simbolas tiun epokon.



Epoque romaine:

Ce n'est pas sans raison qu'on a nommé Nîmes "la Rome française". Encore de nos jours on peut admirer les Arènes, la Maison carrée et le Pont du Gard. Ne sen kialo oni nomis Nîmes "la franca Romo". Nune oni povas ankoraŭ admiri la amfiteatron, la kvadratan domon kaj la akvedukton de la ponto sur la rivero Gard.



Vizito de Muzeo Hurepel en Minerve

1. Jen mi Hurepel : loĝis mi sur roko, lando de suno kaj vento, lando, kie fruas hordeo, vito, olivarboj, la lando de trobadoroj kaj de senjoraj kasteloj ekde kie ŝvebis amo kaj toleremo, la lando de profundaj valoj, de kie aloreligis la sonoro de ĉaskorno kaj de hundoj persekutantaj aprojn.

2. Jes ja, Hurepel, iama kavaliro en Causses (pr.kos), rajdanta super la vertiĝ-donaj ravinoj.

Mia haŭto aspektas kiel ŝrumpinta ledo; kaŭzis tion mia konstanta volo transirigi al vi la historion de ĉi-tiu tero sorbigita de sango.

3. Kiel estas tiam? La "Bonuloj", alidire "Perfektuloj", duope iras prediki de domo al domo, ĉe la paŝtistoj, la notario aŭ la grafo. Ili same duope laŭ polvaj padoj iras de iu mortanto al alia preĝi la lastajn "konsolantajn parolojn".

Kion ili predikas? "Ĉar Dio estas ekstreme bona, estas nekredeble, ke Li kreis nian mondon brutala kaj koruptita. Neniu alia ol "Satano" povas kulpi en tio. Ĉiu ajn animo damne transiras de unu vivanto al alia, de tiu al alia ĝis fine ĝi atingos la dian perfektecon kaj meritos senpekan ekzistadon".

Tiuj "Perfektuloj" estas ja tre malmultaj, sed al la tiamaj moroj de kelkaj diboĉaj, monavidaj katolikaj klerikoj, ili oponas rigoran vivmanieron, kio altiras al ili simpatieco de multaj ordinaruloj.

Ĉu Romo restu senreaga? Ne. Innocent 3a, la Papo, sin turnas al la okcitana nobelaro, kaj admonas ĝin, ke ĝi kontribuu al elradikigo de la tiea herezo. Misiistoj senlace predikas la ĝustan vojon. Sed vane; sub la varma suno de sudo, la cikadoj daŭre ĉirpas kaj neniu folio de morusujo moviĝas.

Pli kaj pli koleras la Papo, ekskomunikas amase kaj minacas krucmiliti.

4. En la jaro 1208, la 14an de Januaro, en albergo ĉe bordo de Rodano estis murdita la legato de Papo, Pierre de Castelnaud, Abato de Fontfroide.

Tuj Romo akuzas Raimon, Grafo de Toulouse, esti la instiganto de la murdo.

Tiu evento estis preteksto por eksplodigi krucmiliton. Estis proklamite, ke estu konsiderate kiel milit-predo ĉiu ajn bieno apartenanta al subtenantoj de la herezo. La episkopoj kaj la prelatoj arigas imponan armeon, kiun konsistigas francaj, rejnlandaj, frisaj kavaliroj, al kiuj oni aldonu dungitajn soldatojn kaj ankaŭ senskrupulajn rabistojn, pretajn profiti el rabado ĉia.

La sudanoj (kiujn pli poste oni nomos :Albigensoj) povus eble rezisti sed ili ne havis eblecon kunigi siajn fortojn, pro insidaj diplomataj intrigoj.

Je la lasta tikla momento, oni pardonas al Raimon, grafo de Tolozo, lian kulpon, kontraŭ kiu oni estis preta batali. Lerta manovro, kiu ebligis al la atakantoj sin turni al alia rezistloko, nome Carcassonne, kies vic-grafo estas Raymon Trencavel, nevo de Raimon. Parenteze ni aldonu, ke pli poste post definitiva venko fare de la Francoj, Eklezio ne hezitas perfide konduki al li malamike.

5. Tiu Trencavel estas tiam 22jara, Vicgrafo de Béziers, Carcassonne, Castres kaj Albi.

De post la decido de lia onklo Grafo de Tolozo ĉesigi rezistadon, li sentas sin terure sola antaŭ la invadanta giganta armeo, kiu jam atingis Montpellier.

Ankaŭ li decidas fine peti pardonon, kaj tiucele galope rajdas al Montpellier. Lerte kaj perfide, la episkopoj kaj la abatoj ĝin rifuzas al li.

6. Li tuj rajdas akcel-galope al Béziers por urĝe organizi defensivon de la urbo. Krome li sendas heroldojn al la baronoj kaj kavaliroj de Minervo, Corbières, Montagne Noire, Lauragais, eĉ ĝis Razès, ke ili urĝe helpu.

Poste li sin direktas al Carcassonne kun espero grupigi sufiĉe da homoj por helpi en Béziers, kiu devos rezisti siaflanke ĝis tiam.

7. Sed la 22an de Julio 1209, apenaŭ la sieĝo komencigas, la rabistoj sukcese perforte malfermas la pordojn de la urbo, kio estis relative facila, ĉar kelkaj Biteranoj provoke eliris el unu el la pordoj. La kavaliroj, tiam ripozantaj kiam okazis la atako, fulme ekprenas siajn armilojn, por ke ankaŭ ili partoprenu la disrabadon. Unu el ili petis de Abato Arnaud Amaury, spirita estro de la milito: "Kiel ni povos distingi la katolikojn disde la herezuloj?". La respondo trafa estis: "Buĉu ĉiujn. Dio rekonos la siaĵojn!". Masakro kaj incendio daŭris du tagojn, kaj laŭ konjektoj pereis 20.000 homoj, tio estas la tuta loĝantaro de la urbo.

8. En Aŭgusto 1209, la katolika Narbonne jure aliancas sin kun la armeo; ĉi-tiu armeo preterpasas la urbon kaj sin direktas al Carcassonne. La urbo restis sieĝata dum 15 tagoj, dum kiuj okazis senkompataj bataloj. Iun matenon unu el la sieĝantoj petas kontakton kun la sieĝatoj kaj konvinkas

Trencavel, ke li venu trakti kun la Francoj. La juna Vicgrafo kun kelkaj traktontoj eliras el la urbo. Ili tuj enkaptiĝas en la insida propono al ili farita senskrupule; Ĵus kaptita, tuj enkarcerigita. Simon de Montfort, freŝe elektita kiel estro de Kristana okcidento, post kelkaj monatoj decidis murdi ĝi la kompatindulon, tiucele ke neniu el liaj partianoj provu iam liberigi lin el liaj katenoj. 9. Subtenita de klerikoj, Simon de Montfort arogas al si la rangon de Vicgrafo de Carcassonne al kiu devas vasaliĝi la okcitanaj baronoj. Kiu rifuzas, tiuj fariĝas ribelantaj kavaliroj, "faidits". El inter ili, ni citu Pierre Roger de Cabaret kaj lian fraton. Instalitaj en neatingebla loko, en "sia aglo-nesto" apud Lastours, ili rezistis al la sturmoj de Montfort, kiu forlasante la sieĝon detruigis ĉion ĉirkaŭantan, vitojn kaj vilaĝojn.

10. La armeo sin direktas al Lauragais, kie ĝi renkontas senhomajn vilaĝojn. Bram rezistas, sed vane. Montfort elektas 100 loĝantojn kiel ostaĝojn. Al ĉiu li krevigas la okulojn, tranĉigas la nazon kaj la supran lipon kaj liberigas la kruele martirigitajn homojn, kiuj, sub gvido de unuokululo vagos en la regiono por terorigi la loĝantojn.

11. La Narbonanoj estis en konflikta rilato kun Minerve, kaj ili per insultaj vortoj kuraĝigis la Francojn plui al Minerve. Tio en Junio 1210. En Minerve troviĝis multaj "Perfektuloj" elmigrintaj el la konkeritaj urboj sub la protekto de Vicgrafo Guilhem. Fortika estas la urbo, kaj ne eblis venki ĝin per sturma atako. La armeo instalas sieĝajn maŝinojn el inter kiuj giganta katapulto: "la Malvoisine". Iom post iom, tegmentoj, muroj defalas kaj kreskas la nombro de viktimoj, tio-ĉi sub la varmega somera suno.

12. Iun dimanĉon, profitante la nigran de la nokto, eta sturmgrupo provas ekflamigi "la Malvoisine". Sed ve! Gardostaranto, kiu ĝuste estis iom for, pro "natura bezono", alarmas. "La Malvoisine" staros plu!

13. La somera vetero estis pli ol kutime varmega kaj seka. La cisterno estis malplena. Provizore nur el puto St Rustique oni povas ĉerpi akvon, ĉar ĝi estas iom protektita el la trafo de sagoj de la arkistoj. Sed post ĝia detruo fare de katapultoj, aldoniĝas al la sufero de la Minervanoj la terura bezono de akvo.

Guilhem deklaras sin venkita. Oni devigis lin forlasi la urbon kaj restis la Kataraj rifuĝintoj, je la dispono de la klerika justico. Al tiuj, kiuj akceptos repaciĝi kun Eklezio, oni lasos al ili la vivon. Sed 140 "Perfektuloj" rifuzas forĵuri sian kredon. Kaj fine de Julio, ĉe krepusko, dum nokto falas sur Causse, sub ĉirpado de griloj, 140 homoj (viroj kaj virinoj), paŝeto post paŝeto, sin direktas al ŝtiparo, kiun oni ĵus ekflamigis, en kiun stiparon multaj sin mem ĵetos.

14. "Damoj nobelaj, mi, trobadoro, iam venis al viaj kasteloj regali vin per muziko kaj glorigi vian belecon. Sed nun, en tiu epoko de malfeliĉo, aŭskultu la rakonton pri la kompantinda Messire de Termes. El de la supro de siaj remparoj, li spitis la "putenan" aĉulan episkopon kun liaj soldatoj, dum semajnoj kaj semajnoj, kvankam grandiganta soifo instigus lin al rezigno pri rezisto.

Kaj jen! subita pluvego pro fulmotondro plenigis la cisternojn, kvazaŭ bono de Dio; dume la soldatoj frostis sub siaj tendoj. Sed ve, ratoj krevintaj en la cisterno poluciis la tiel sopiratan akvon. Multaj el miaj kunuloj, defendantoj de la loko, fariĝis ege malsanaj, ne plu kapablaj batali. Ili fuĝis nokte en la montojn. Kiel ĉaspreto senforta ili lasis sin masakri fare de la senkompataj francaj soldatoj. "Raimon, la maljunulo" estis kaptita, enkatengita en karceron, kie li mortis post kelkaj jaroj.

15. Ankaŭ Puivert estas venkita. Multaj "faidits" grupigitaj de la energia Aymery de Montréal alkuris ĝis Lavaur, kiun Montfort eksieĝis. Post malvenko, Montfort ŝtiparumas 300 aŭ 400 "Perfektulojn" rifuĝintajn en la urbo, kaj ordonas pendumon de la "faidits". La pezo de la korpo de Aymery de Montréal krakigas la pendumilon, kiu rompiĝas, kio kolerigas Montfort. Montfort tranĉigas la gorĝon de 80 kompatinduloj. Ankaŭ Dame Guiraude, fratino de Aimery, suferis plej humiligan performon; poste ŝi estis ĵetita en puton kaj stonumita.

16. Simon de Montfort plu kaj same agis sed neniam sukcesis elradikigi la skismon el Langvedoko. Li estis mortigita sub la remparoj de Tolozo en 1218 per pafo de katapulto, kiu laŭdire estis manipullata de virinoj.

Iom post iom la okcitananoj ree konkeras sian landon ĝis... ĝis nova dua krucmilito. Inkvizicio enradikiĝis ĉie. Sed eĉ 20 jarojn poste Monségur ankoraŭ rezistis kaj nur en 1255 cedis Quéribus. La lasta "Perfektulo" Guillaume Belibaste estis ŝtiparumita en Villerouge-Termenés en 1321.

Koncerne min, Hurepel, kavaliro el Causse, en tiu roko inter Cesse kaj Brian mi gravuras mian lastan krion: Demori! (mi restas)

TRA LA FEDERACIO :

BEZIERS : Antaŭ la somera interrompo, ni decidis pri la datoj de la venontaj kunvenoj. Verŝajne la forumo de Asocioj okazos la 17an de Septembro. Do:

- Sabaton, la 10 an de Septembro (ekkontakto, preparo de Aleoj de Asocioj)
- Sabaton, la 8an de Oktobro

Ambaŭ laŭkutime en "Maison des Associations" je 14h30.

STAĜO : Ĝi bone disvolviĝis ĝuste antaŭ la kongreso. Verŝajne tiu cirkonstanco favoris ĝin. Neniam partoprenis tiom da homoj : 46; ĉiuj estis tre kontentaj pri la kursoj, kiujn sperte gvidis S-ro Thierry, S-ino Bernard kaj S-ino Cielecka, Polino.

Al ĉiuj niajn plej sincerajn dankojn. La vesperoj estis ŝatataj de ĉiuj : prelegoj de S-ro Thierry kaj S-ino Cielecka, teatraĵetoj kaj poemoj. Tiurilate ni devas aparte danki J-P. Peray, kiu sperte laboregis pri la surscenigo de la skeĉoj (por la staĝo same kiel por la kongreso). Malgraŭ ne tro agrabla vetero, ĉiuj aprecis la situon kaj akcepton en Batipaume. Espereblas, ke la venonta staĝo tiel sukcesos.

Pro malbela vetero, la ekskurso planita al Roquebrun la 26an de Junio ne povis okazi. Prokrastite !

MONTPELLIER :

Lastaj kunvenoj: La 18an de Majo ĉeestis 9 homoj. André Capus, Louis Ensuque kaj Annick Tora parolis pri la kongreso : programo, nombro da aliĝintoj, malfacilaĵoj ne gravaj sed oftaj, kiujn ni travivis.

La 1an de Junio ĉeestis 15 homoj. Louis Ensuque prezentis ĉirkaŭ 60 lumbildojn pri la ĵus okazinta nacia franca kongreso : diversaj kunvenoj, vesperadoj, ekskursoj...

En Septembro: La forumo de la asocioj okazos la 11an de Septembro. Ne forgesu viziti la budon de nia grupo.

La Internacia Semajno de Sète disvolviĝos de la 3a ĝis la 10a de Septembro. Ĝi estos la dudeka . Gratulojn al la organizantoj ! Ni esperas, ke okazos multaj aliaj Internaciaj Semajnoj.

NIMES : La trijara kunveno de la esperantistaj poŝtistoj okazis en Nîmes la 26an kaj 27an de Junio. Partoprenis dekkvino da personoj el diversaj regionoj.

Nia federacia vicprezidanto Louis Ensuque estis alelektita vicprezidanto. Gratulojn ! Respondeis pri la aranĝo René Driolle (Nîmes) kaj Roger Colney (Gap). Turisma programo kompletigis la ĝeneralan kunvenon.

RODEZ : S-ino Nina Korjenskaja (Rusio) vizitis la grupon en la kadro de prelegvojaĝo de UFE kaj lerte prezentis la Rusan pentroarton.

S-ro Bojaĝiev (Bulgario) denove venis al Marvejols (Lozère).


ARIEGE : La ĝenerala kunveno de "Esperanto- Ariège" (CEEA) okazis en Moulis.

Post la sukceso de la 5a ĥoro-staĝo, jam prepariĝas la sekvontjaraj staĝoj. Ĉu la 1995a ĥoro-staĝo daŭru du semajnojn por pli bone ĝui tutan restadon en tiom bela regiono ? Anoncu viajn emojn kaj petu aliĝilojn plej frue ĉe Jorgos 09120 St Félix de Rt.

Forumo de Asocioj estas unu el la plej efikaj eblecoj por varbi por Esperanto. Se vi deziras partopreni forumon en via urbo kaj bezonas helpon aŭ materialon , kontaktu la federacion (tel: 66 32 86 36 / 67 58 6418)

DISTRA PAĜO

KRUCVORTOJ



	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	K	O	N	T	R	A	B	A	N	D
II	O	N	O	M	A	T	O	P	E	O
III	R	O	B	■	D	I	V	O	R	C
IV	E	M	E	T	I	K	■	■	■	V
V	S	A	L	I	K	■	M	K	■	N
VI	P	T	■	N	A	Z	A	R	E	T
VII	O	O	■	L	A	R	I	K	■	■
VIII	N	P	L	N	■	L	I	B	R	O
IX	D	E	■	E	M	B	A	R	A	S
X	E	O	Z	I	N	■	N	I	N	A

Solvoj de la 128-a

Solvo de la lingva ekzerco (n° 127)

Certeco: de 0% ĝis 100%
 Maleble, dube, neverŝajne, malcerte, eventuale, eble, supozeble, probable, verŝajne, certe, tutcerte.

Ofteco: de 0% ĝis 100%
 Neniam, preskaŭ neniam, malofte, neofte, foje, kelkfoje, multfoje, ofte, tre ofte, preskaŭ ĉiam, ĉiam.

HORIZONTALA

- I) Strata virgulin(o), foje.
- II) Ĉ(i) tro solas por gustigi / Portempa loĝej(o).
- III) Marista ŝnur(o) / s : Kia zoisto !
- IV) Dia kirurgio / Eksist(o).
- V) Iama tiarejo.
- VI) Iu fin(o) por Sokrato / Ĉu tuj far(i) ?
- VII) Vaporig(i) / Akve florenca.
- VIII) Fonte de azia rivero / Radike, ĝi povas porti kronon.
- IX) Kontraŭsence, fama fajroŝprucigivant(o) / r : Sen ĝi nenia balo, laŭdire.
- X) Sen ŝi nenia balo...

VERTIKALE

- 1) Sufiĉe senherbigint(a) la carbon, laŭdire.
- 2) Arto, foje / Irmaniero.
- 3) Mezalta aer(o).
- 4) Prepozicio / Mahometid(o).
- 5) Akv(o) al maro / El Osako.
- 6) Nereal(a) / Senorda grenuj(o).
- 7) Mara rabfiŝ(o) / Kritik(i).
- 8) Liter(o) de Helena, origine / Heroo de Kornelio.
- 9) Radiko sen cetero / Rosteĵ(o).
- 10) Trumpete.

s : sone
r : returnite

La venonta "Sudfrancia Stelo" aperos komence de Oktobro. Sendu viajn kontribuojn antaŭ la 25a de Septembro aŭ alportu ilin al Béziers al la federacia kongreso. Redaktas la buletenon: J. Héris, Rte de Montcayrour 48500 La Canourgue. Anticipan dankon !

D-ro BERTHONNEAU

AGRABLAJN SOMERFERIJN

SOMERAJ ANEKDOTOJ :

En la maro naĝas du viroj. Unu alparolas la alian:
 -Pardonu, ke mi demandas, kial vi banas vin en frako kaj ĉapelo, dum ĉiuj ceteraj banas sin en bankostumoj?
 -Nu, la afero estas tia, -respondas la demandito,- ke ĉiuj ĉirkaŭ mi banas sin, dum mi dronas...

Gasto provas eniri en ludkazinon en Monte Carlo.
 -Pardonu, -haltigas lin la pordisto,- sed ĉi-tien oni ne rajtas eniri sen kravato.
 -Kial ? -protestas la gasto. -Jen, apud vi staras ulo, kiu eĉ ĉemizon ne surhavas.
 Ĉu li rajtas?
 -Jes, ĉar li ne estas venanta, sed foriranta.
